# STARTO


## N-ro 3/2024 (292)

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**


Aruŝo, Tanzanio, la 9-an de aŭgusto 2024




Foto Marry Raphael Godwin

La ĉeĥa teamo transprenas la kongresan flagon

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz redakce@esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marček: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (mem-stariĝis: handikapitoj, junularo, fervoj-istoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**
2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

# Výbor ČES:

**Předseda:** Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz**:** (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

**Místopředseda:** Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

**Pokladník:** Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

**Člen výboru**: Leonarda Chaloupková, leonarda.chaloupkova@esperanto.cz (kluby a sekce, konference, granty)

**Člen výboru:** Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

**Redaktor Starta:** Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:**
Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201,
chrdle@kava-pech.cz

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy,
muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

**Facebook kaj Ipernity**
www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

# REZOLUCIO DE LA 109-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, ARUŜO, TANZANIO

La 854 kongresanoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), venintaj el 65 landoj al Aruŝo, Tanzanio, inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto 2024, traktis la temon "Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo". La partoprenantoj de la kongreso ne nur diskutis la temon, sed samtempe prezentis modelon por pli bona mondo, en kiu homoj el multaj diversaj landoj povas pace kunvivi kaj interkomuniki sen tradukistoj per la internacia lingvo Esperanto, kiun ĉiuj kongresanoj parolas.




Kun ĝojo la partoprenantoj konstatas, ke tiu unua Universala Kongreso en Afriko plene sukcesis. Ĝi pruvis, ke en Afriko la movado por neŭtrala internacia lingvo, nome Esperanto, estas vigla; ke ĝi aktivas en multaj landoj de la afrika kontinento; kaj ke la afrikaj esperantistoj liveras valoran kontribuon al la universaleco de la tutmonda Esperanto-movado. Kun sama ĝojo la partoprenantoj observas, ke multaj junaj homoj en afrikaj landoj lernas Esperanton en kursoj kaj ke en multaj afrikaj landoj estas planite organizi pli da kursoj por ebligi al pli da homoj personajn internaciajn kontaktojn per Esperanto.

La kongresanoj alvokas al ĉiuj homoj protekti la medion, ĉar sana medio estas antaŭkondiĉo por atingi la celon konstrui pli bonan mondon. Ili alvokas al ĉiuj homoj de la tero konsideri utiligi dum vojaĝoj transportilojn, kiuj konsumas malpli da energio, prefere el daŭripovaj fontoj kiel suno aŭ vento, kaj kunlabori por kompensi la emision de forcejaj gasoj, kiam ankoraŭ ne eblas tion eviti.

La kongresanoj konstatas kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, kiu ebligas kontaktojn inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj en Orient-Afrika Komunumo (OAK) sen bezono uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas subtenon kaj necesas agnoski la lingvajn rajtojn de ties parolantoj, aparte en baza edukado, koresponde kun la rekomendoj de Unesko. Tio estas bazo por paco, por pli bona mondo.

Por tutmonda interkompreniĝo necesas komuna neŭtrala internacia lingvo, kiun ĉiu homo povu paroli apud sia gepatra lingvo. La kongresanoj konstatas kun ĝojo kaj fiero, ke ankaŭ en tiu ĉi kongreso evidentiĝas, ke Esperanto plene taŭgas por tiu celo.

# La unua afrika UK

La unuan UK-on en Afriko karakterizis precipe juneco – el 850 partoprenantoj duono estis afrikanoj, precipe el Tanzanio, Burundo kaj Kongo, kaj plejparto el ili estis gejunuloj. Kutime ili konas tri lingvojn (triban, svahilan, anglan) kaj Esperanton ili akceptis kiel la kvaran kun entuziasmo.



Nia 5-membra ĉeĥa teamo partoprenis unue antaŭkongreson, tritagan ekskurson al tri safariaj parkoj kaj ankoraŭ du aliajn ekskursojn dum la kongreso – al serpentejo kaj kafoplantejo kaj al Kilimanĝaro – la pli sportemaj turisme marŝis tra arbaro, la aliaj vizitis parkon sub Kilimanĝaro, kie eblas karesi kaj manĝigi ĝirafojn, zebrojn, gazelojn kaj amindan simieton kaj eĉ karesi dormantan leonon. En safario ni vidis elefantojn, zebrojn, ĝirafojn, bubalojn, aprojn, pavianojn, hipopotamojn, hienojn, strutojnn, vulturojn kaj aliajn birdojn.



La serpentejo estis malgranda zoo ne nur kun serpentoj, sed ankaŭ kun krokodiloj. Apude ni poste vizitis hospitalon por kuraci pacientojn morditajn de venenaj serpentoj, kaj muzeon de masaoj, kiuj montris al ni sian tradician nomadan vivon.

Sur monto Meru junuloj montris al ni, kiel oni kultivas, rikoltas, rostas kaj trinkas kafon. La rezulton ni gustumis.



Rekte kontraŭ la kongresejo estis nacia muzeo kun ekspozicio pri evoluo de Afriko kaj de homoj dum lastaj milionoj da jaroj kaj eksterdome malgranda botanika ĝardeno kun 160-jarojn aĝa testudo moviĝanta kiel tanko.



La trotuaroj en la urbo ne estas ankoraŭ bone prilaboritaj, preskaŭ ne estas uzataj semaforoj, la veturiloj kaj homoj miksiĝas, kirliĝas kaj svarmas, tamen ni vidis neniun akcidenton. La homoj estis afablaj, salutis nin „Karibu!“ (Bonvenu!), kiam ili vidis blankulojn.  Multaj estis verŝajne malriĉaj, tamen ĉiuj havis saĝtelefonon, ofte motorciklon aŭ aŭton, kiujn ili uzis kiel taksiojn. Sur la stratoj ili proponis varojn, iam iom trude.

## La movada foiro

Sabate la 3-an de aŭgusto 2024 okazis en la korto de la kongresejo la t.n. movada foiro, kie unuopaj esperantistaj organizoj povis prezenti sian agadon.



Nia tablo propagandis nian UK 2025 en Brno utiligante kanton kreitan de Mirka Tomečková laŭ melodio de „Dancu, dancu, ne staru“, nome:

En la jaro dudek kvin, dudek kvin,
Ĉeĥa lando logos vin, logos vin,
Se vi volas feliĉi, feliĉi,
ne hezitu aliĝi, aliĝi.



Kiu venis por nia Unua Bulteno, ricevis ankaŭ tekston de la kanto kiel glumarkon kaj tuj povis kanti.



## La solena inaŭguro

La kongreso estis solene inaŭgurita en la plej granda salonego dimanĉe antaŭtagmeze. Estis akcentite, ke afrikaj esperantistoj finfine atingis UK-on en sia kontinento. Per video la kongreson salutis Margaret Zaleski-Zamenhof.

Anstataŭ kutimaj salutparoloj estis laŭ alfabeto nomataj unuopaj landoj kaj la partoprenantoj el tiuj landoj ekstaris. Vokante Ĉeĥion oni aldonis, ke ni venontjare gastigos UKon en Brno.




## La kongresa bankedo

Lunde la kongresanoj kolektiĝis en komuna bankedo, kiu ĉi-foje estis malfermita por ĉiuj. Kantis nigrulaj kantistoj, multaj kongresanoj dancis.



## Programoj dum UK

La kongresanoj povis ĉeesti teatraĵojn, koncertojn kaj multajn prelegojn.




Realiĝis ankaŭ interesaj renkontiĝoj, ekz. kun UEA-prezidanto D. Charters



aŭ kun LKK-ano Mramba Simba



kiu dank' al Esperanto trifoje fariĝis vilaĝestro, havas tri edzinojn kaj 24 infanojn. Li prizorgis nian transporton al la flughaveno.

## Manĝejo

Manĝi oni povis sur la tegmento de la kongresejo sub du grandaj tendoj.



## Kongresaj ekskursoj

Merkrede estas ĉiam la kongresejo fermita, la kongresanoj povis partopreni en pluraj ekskursoj, ekz. al kafoplantejo,



besto-parko kaj marŝo al Kilimanĝaro.



# Transdono de la flago

Kutime la kongresa flago estas transdonata al la sekva kongresa urbo dum la solena fermo, sed ĉar nia grupo havis flugbileton por sabato matene, ni ricevis la flagon jam vendrede vespere, tuj post nia prezento de Brno kiel sekva kongresa urbo.

# La kongresa kuriero




Sub la titolo **La voĉo de Kilimanĝaro** aperis sep numeroj de la kongresa kuriero, kiuj estas elŝuteblaj en la retejo de UEA:
https://uea.org/kongresoj/uk/2024
Jam la unua numero alportas saluton de **Maximilian Iranghe,** Urbestro de Aruŝo.

# Konga stelo

Samtempe aperis la unua numero de gazeto de la konga junularo **Konga stelo**





redaktata de Joel Muhire, elŝutebla ĉe esperanto-indre.com/spip.php?article562

# Kongresa Libroservo

En la kongresa libroservo estis troveblaj kelkaj novaĵoj, ekz. **La knabo, kiu vivis kun Strutoj** (Monika Zac), **Ture Sventon en la dezerto** (Åke Holmberg), **Palomar** kaj **La kosmokomikoj** (Italo Calvino), **La sekreta vivo de miaj najbaroj** (finalistaj noveloj de la Interkultura Novelo-Konkurso), ne mankis verkoj pri la svahila kaj haŭsa lingvoj, prelegaro de la Internacia Kongresa Universitato kaj ankaŭ T-ĉemizoj kun esperantistaj kaj tanzaniaj motivoj.

# Belartaj Konkursoj

Dum la kongreso estis proklamitaj venkintoj de Belartaj Konkursoj. *Poezio*: **Litera Turo** kaj **Reveno** de Evgenij Georgiev el Kazaĥio, **Mia lasta vizito** de Benoît Philippe el Germanio. *Prozo*: **Brodita tuketo** de Ewa Grochowska el Francio, **Plano B** de Debra Hamel el Usono, **Lia sekreto** de Cho Sung Ho el Koreio. *Mikronovelo*: **Enamiĝinto** kaj **Unuaj amrendevuoj** de Jorge Rafael Nogueras el Usono, **Ridetema soldato** de Yin Jiaxin el Ĉinio. *Teatraĵo*: **La krimulo kaj la Floro** de Raffaele Del Re el Italio. *Skeĉo*: **Nova fianĉino** de Ewa Grochowska el Francio. *Infanlibro*: **Doktoro Esperanto kaj la lingvo de Espero** de Mara Rockliff, ilustrita de Zosia Dzierżawska, eldonita de E-Asocio de Britio.




*Eseo*: **De drako al loongo: la malfacila tasko esperantigi ĉinajn vortojn** de Rafael Henrique Zerbetto el Brazilo. *Kantoteksto*: **En la trajno de mil duboj** de Jorge Rafael Nogueras el Usono, **Liven Dek, diru jam!** de Jorge Rafael Nogueras el Usono, **Lasta amo** de Ewa Barbara Grochowska el Francio, **Sen vi** de Virágh Ferenc el Germanio, **Inferaj inaj vivoj** de Serĝo Sir' el Francio.

*Laŭ La voĉo de Kilimanĝaro n-ro 6*

# Ideokreado en Prudká 2023 - fina stato kun komentoj de ĈEA komitatanoj

*Na loňské konferenci v Prudké jsme od účastníků obdrželi nápady ve čtyřech kategoriích. V lednu jsme vás informovali o tom, jak jsme s nimi naložili a nyní si můžete přečíst nejaktuálnější stav. Některé nápady jsme uzavřeli, jiné jsou stále aktuální a jak s nimi výbor ČES dále pracuje, se můžete dočíst v tabulce. Sem se nám vejde jen část, celou tabulku naleznete na stránkách svazu* www.esperanto.cz.

| | | Stav září 2024 |
|---|---|---|
| **Co je dobré** | | |
| Dále usilovat o organizování UK v Brně | | UK - práce na přípravách usilovně pokračují, Loka Kongresa Komitato se sešel prvně v září. |
| **S čím přestat** | | |
| V případě, že neesperantista dorazí na sraz, nenechat ho samotného, ale zároveň ho nezavalit příliš informacemi. | | Viz strategie ČES, která rozděluje lidi dle míry zájmu o EO do několika fází. Každá fáze vyžaduje jiný druh informací. ČES by měl v ideálním případě informovat všechny. |
| Mluvit česky na eo akcích. | | Není to úplně možné, protože chceme být otevření mluvčím všech jazykových úrovní včetně úplných začátečníků. Na tento problém jsme narazili, když jsme přemýšleli o organizaci internetové postkonferenci - vést ji v češtině nebo esperantu? Nakonec jsme se rozhodli uspořádat obě varianty. Česká bude otevřená i lidem, kteří nemluví, ale zajímají se o esperanto, esperantská umožní zahraniční účast. |
| Nedovolit přednášet lidem, kteří neumí přednášet | | Bohužel se nikdo nepřihlásil k vedení dílny. |
| **Co chce změnu** | | |
| Promyslet hybridní konference a kongresy | | Bohužel nebylo dosud zpracováno. |
| Akce na esperanto.cz dávat automaticky na eventaservo, nezadávat je ručně. Vyzvat lidi, aby české akce byly na eventa servo. | | Zjišťujeme, zda-li nový web esperanto.cz může výhradně využívat kalendář eventaservo.org. |
| Nové webové stránky esperanto.cz. | | Pracujeme na tom. |

| **Co začít** | |
|---|---|
| Podřídit se jazykovým zkouškám KER na všech úrovních, aby K. Kováts nedostávala otázky, zda nezapomněla přidat pár nul, psaní počtu procházejících | Pedagogická komise pomohla při organizaci online kurzu pro začátečníky, ale její vedoucí Jana Melichárková bohužel svou činnost v ní ukončila, takže nyní komise nefunguje. Pokud máte zájem o učení, ozvěte se nám. |
| Je možné použít nápad e-klubo Brno – dělat internetové přednášky – nejen pro brněnský klub, ale pro všechny, kteří by měli zájem ať už se přihlásit či přednášet? | Zájemci o prezentovaní nechť se přihlásí u EK Brno (milan@milankolka.cz). |
| Navštěvovat operu Sternennhoch, která užívá esperanto, protože ji vidělo snad několik desítek esperantistů, přestože je v pražském Národním divadle několik sezon vyprodaná | Prosincovou derniéru zástupci ČES měli možnost vidět, v závěru předali účinkujícím drobné dary s poděkováním jménem ČES. Uzavřeno. |
| Informovať mladých o možnosti stážov ať v esperantských zahr. Organizáciách (napr. E@I v ND) aj bez znalosti esperanta, které sa možú naučiť tam | Požádáme Petra Baláže o bližší informace, které následně zveřejníme ve STARTu a na webu. |
| Překladový seminář – lidové písně (nejen) | Diskuse s potenciálními zájemci proběhla, ale na systematičtějším setkávání se zatím shoda ani ochota nenašla. Neformální překladová skupinka funguje u pražského klubu E-mentál. |
| Pisatelia textov pre Malovca | Obnovilo se fungování redakční rady pro web esperanto.cz, část obsahu je použitelná pro Starto. |
| Speváci: povinne naštudovať a doplňať wikikantaro | Nemáme informace o zájemcích o tento druh semináře. |
| Hledat lingvisty, kteří se zajímají o esperanto případně politiky | Bohužel bez ohlasu členstva, ale výbor na tomto pracuje v rámci UKo 2025. |
| Ukazuje se nutnost spolupráce s E-svazy okolních zemí (Německo, Polsko), protože časem možná vznikne EVROPSKÝ SVAZ namísto místních územních státních svazů | Na rok 2026 připravujeme společnou konferenci s německými esperantisty. |
| Organizovat jazykové semináře, školící pro zkoušky KER, případně udělat jednu zkoušku KER v Česku | Je pravděpodobné, že zkoušky KER budou i v Brně v roce 2025. Záleží na ILEI. |

| | | |
|---|---|---|
| Pokusit se navázat kontakt s E-mládeží – jednotlivci, o kterých víme. | | Bývalí členové mládeže byli kontaktováni, Vít Mišurec se nabídl, že aktualizuje webové stránky. Zatím bohužel bez výsledku. |
| Do nabídky Brna – Uko 2025 možno přidat dlouholetou tradici esperanta (1. esp. klub, radioelsendo Verda Stacio …) | | To patří do Dua Bulteno a časopisů, které budou o Brně informovat, určitě připravíme. |
| Zjistit možnosti dotací od evrop. Programů např. Erasmus. Za současný úbytek čes. esperantistů můžeme částečně I sami, že jsme naše děti, rodinné příslušníky nedokázali (z různých důvodů) nadchnout pro esperanto a stát se členem esperantského hnutí | | Z programu Erasmus budeme čerpat dotaci pro případnou společnou konferenci v roce 2026 s Němci. Na základě zkušeností budeme plánovat dále. |

## 76-a IKUE-kongreso Brno 2025

Tuj post la UK 2025 Brno okazos en la sama urbo ankaŭ IKUE-kongreso ekde sabato la 26-an de julio ĝis sabato la 2-an de aŭgusto 2025 en la Eklezia hejmo de junularo Petrinum, strato Veveří 15.

■ Dum nia UK renkontiĝos ankaŭ virinoj, blinduloj kaj aliaj esperantistaj organizoj.

## KAEST 2024

Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazos ĉi-jare en Žilina, 7-10 novembro 2024, kun la temo: **Esperanto kaj lingvolernado en la epoko de artefarita intelekto kaj virtuala realo**. Aliĝu ĉe https://kaest.ikso.net/2024/.

# 5-a Virtuala Kongreso de UEA

**(senpaga por individuaj membroj de UEA aliĝintaj ĝis la 13-a de novembro!)**

La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto (**VK**) okazos de la 28-a de novembro ĝis la 1-a de decembro 2024! Jam eblas aliĝi al ĝi: vk.esperanto.net/2024.

# Kion faris la komitato

*Rete kunvenas ne nur la komitato, sed ankaŭ la redakcio de la asocia domajno, muzea grupo, gvidantoj de kursoj kaj LKK por nia UK 2025 en Brno. En ĉiuj grupoj laboras ankaŭ la komitatanoj.*

**19.6.** La muzea grupo traktis pri nova retejo de la muzeo

**27.6.** Unua kunveno de personoj, kiuj aŭtune gvidos retan babiladon por paroligi niajn kursanojn.

**8.7.** La redakcio priparolis bezonatajn artikolojn en la asocia retejo pri la kongreso 2025, pri Tago de Esperanto (26.7.), kaj ankaŭ kion meti en la Unuan Bultenon por UK. En tiu tago venis la ŝoka informo pri forpaso de J. Suchánek.

**23.7.** La komitato parolis precipe pri la forflugo de ĉeĥa teamo al Aruŝa, kie ili propagandos nian UK-on. Estis kreita speciala T-ĉemizo kaj koltuko kun la kongresa emblemo kaj presita Unua Bulteno. La magistrato de Brno donacis kelkajn suvenirojn. Forgesita ne estis ankaŭ la konferenco en Česká Třebová kaj stato de ĝia prepariteco.



**29.7.-11.8.** La ĉeĥa teamo estis en Aruŝo, dum la movada foiro disdonis suvenirojn kaj Unuan Bultenon, post semajno ĝi prezentis en la ĉefa salonego la kongresurbon Brno kaj transprenis la kongresan flagon, kiun nun gardas la prezidanto de KE Brno Milan Kolka.

**12.8.** La redakcio priparolis artikolojn pri la aŭtunaj kursoj kaj babilado en la asocia retejo kaj la asocia Fejsbuko.

**20.8.** Testado de Babilado, la moderatoroj provis, kiel funkcias la reta renkontiĝejo.

**27.8.** La komitato traktis pri la elekta komisiono, ĉar en 2026 okazos asocia kongreso, kiu elektos novan komitaton. Estis reeeldonita la Marček-lernolibro por kursoj, kiujn gvidos Milan Kolka.

**2.9.** Estis pritraktita la temo de la unua Babilado sekvatage.

**3.9.** La unua Babilado pri la temo *Someraj ŝatokupoj*, moderatoris Petr Miňovský.

**5.9.** Reta kunsido de LKK kun Dorota Rodzianko kaj Peter Baláž. Ĉiu LKK-ano sin prezentis kaj diris, kion li faros en la teamo. Dorota diris, ke ŝi tre baldaŭ bezonas utilajn informojn pri Brno por Dua Bulteno. Ĉar jam venis pluraj petoj pri invitleteroj, ŝi klarigis, ke neeŭropanoj povas peti pri vizo ne pli frue ol 3 monatojn antaŭ la kongreso; se ili aliĝos, ili ricevos konfirmon, ke ili estas aliĝintaj, sed neniam oni sendos al ili invit-leteron. La invitanto devus ĉe fremdul-polico deponi grandan monsumon kaj transprenus ĉiujn riskojn pri la invitito.

# LA EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO

## STRASBURGO 8-12 de MAJO 2024

Ĝi okazis en Strasburgo, kie troviĝas pluraj internaciaj institucioj. Strasburgo estas la ĉefurbo de la Granda Orienta-regiono (Alzaco, Loreno kaj Ĉampanjo).

La eventon partoprenis 618 geesperantistoj el 35 landoj ne nur el Eŭropo, sed ankaŭ el aliaj kontinentoj. Al la kongreso, krom la ĉeforganizanto, Espéranto-France, aliĝis la Germana E-Asocio (GEA), la Belga E-federacio (BEF), la Svisa E-Asocio (SES), la Itala E-Federacio (IEF), la Internacia Fervojista E-Federacio (IFEF) kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Ĉeestis kaj la programon pliriĉigis per siaj intervenoj ankaŭ kelkaj estraranoj de UEA. La loka asocio organizis E-budon ĉe la eŭropa parlamentejo.



La kongresejo troviĝis en la strasburga universitato tute proksime al la urbocentro. Ĉe la alveno, en la vasta halo bonvenigis nin per kanto la famkonata grupo Kajto. Tuj ekestis bona etoso kaj la ĉeestantoj kunkantis. Ne pretervidebla estis kontraŭ-milita ekspozicio instalita tie. Ankaŭ eblis ricevi E-afiŝon por eŭropaj elektoj.

La prezidanto de Esperanto-Francio kaj de la loka kongreskomitato Bruno Flochon inaŭguris kaj salutis la ĉeestantojn de la kongreso. Bonvenigajn vortojn aldonis ĉiuj partneraj asocioj kaj aliaj institucioj. Surekrane salutis la kongresanojn la urbestrino s-ino Jeanne Barseghian kaj la estraranino de la Rejna Konsilio. La inaŭguro finiĝis per kantado de la Esperanto-himno. Tuj poste ni estis invititaj al aperitivo kun kuglof-kuko. Ridetoj kaj ĝojo regis dum renkonto kun konataj geamikoj kaj koniĝo kun novaj esperantistoj. En angulo estis vendataj kelkaj E-produktoj, biero kun Esperanto-etikedo sur la botelo, veganaĵoj, marmelado kaj aliaj bongustaĵoj. La ĉeestantoj povis ankaŭ admiri filatelan ekspozicion, aĉeti bildkartojn kaj poŝtmarkojn aŭ specialan koverton dank' al Michel Basso. En gazetoj aperis pluraj artikoloj pri la evento.




La temo de la kongreso estis "Dialogo inter eŭropaj popoloj, portanto de paco", bone pritraktata dum pluraj okazoj. La programo de la Eŭropa Esperanto-kongreso estis tre varia kaj riĉa.



Estis prezentitaj multaj allogaj programeroj kaj prelegoj. Iom simile kiel dum la Universalaj Kongresoj estis malfacile elekti, ĉar pluraj okazis samtempe. Bone funkciis libroservo, E-kursoj, Scienca Universitata Sesio (SUS). Spontanee okazis kant-ateliero kun Kajto, omaĝo al William Auld kaj Marjorie Boulton, prelegoj kaj preparoj al KER-ekzamenoj, vesperaj koncertoj kaj multnombraj ekskursoj. La famkonata grupo Kajto Ankie kaj Nanne tutan daŭron de la evento animis la programon per siaj kantoj kaj kantigis la ĉeestantojn en pluraj okazoj.



Vespere okazis pluraj koncertoj de konataj kaj malpli konataj esperantistoj, inter kiuj muzikistino el Italio Klarisa. Ŝi ludis harpon kaj kantis en pluraj lingvoj amkantojn, Tim gitaris kaj kantis popularajn kantojn, Inicialoj D.C. uzis en sia programo sinkronizitajn videofilmojn. Jonny M prezentis regenstilan muzikon, Ralph Glomp adaptis kaj komponis muzikon kantante poemojn de Marie Hankel, Gijom' Armid ludis pianon kaj kantis siajn novajn iom utopiecajn verkojn. La muzikan kulturan programon teknike kaj bone prizorgis Floreal Martorel.

En la programo estis proponataj pluraj ekskursoj en la urbo mem aŭ en la ĉirkaŭaĵo de tiu bela alzaca regiono. Dum pluraj lokaj ekskursoj la esperantistoj povis profiti ŝipadon sur kanaloj de Strasburgo kun esperantlingvaj komentarioj, kaj admiri belajn pejzaĝojn. Eblis ankaŭ koni la urbon per turismaj trajnetoj, viziti la katedralon, parlamentejon, muzeojn ktp. Por fervojistoj estis alloga vizito de muzeo en *Mulhouse*. La postkongreso kondukis al bela urbo *Colmar*, kie antaŭ sep jaroj okazis IFEF-kongreso. Do, eblis refreŝigi la memorojn pri tiu pitoreska urbo.



Dum la fermo de la kongreso estis projekciataj segmentoj el kongresa etoso por freŝe rememori agrablajn momentojn. Dum la muzikaj paŭzoj denove prezentiĝis: Tim, Gijom' kaj Kajto. Estis memorigita la unua franc-germana kongreso, kiu okazis en Strasburgo en la jaro 1969. Kelkaj el la partoprenantoj ĉeestis ĝin infanaĝe. Fine oni alvokis sur la podion kelkajn kunlaborantojn kaj dankis kvindek aliajn.

*Liba Gabalda*

# Koncize


■ **Verdaj Skoltoj** tendumis en Ĉeĥio inter dimanĉo la 14-an de julio 2024 ĝis merkredo la 24-an de julio. Venis 24 skoltoj el 8 landoj, pri kio ili informas en sia revueto de Verdaj Skoltoj **2024-08-Revueto_8** trovebla en ilia retejo https://verdajskoltoj.net. La tendumado okazis en Ralsko-Mimoň. En la retejo estas ankaŭ *Oftaj demandoj*, kie eblas informiĝi pri iliaj principoj.

■ **Ret-komunikoj de ĈEA** estas renovigitaj, jam aperis du numeroj. Se vi deziras ricevi ilin, bonvolu skribi al komitato@esperanto.cz.

■ Naiva artisto Josef Bouchal kreis originalan **Krucstacion** sur la arbara vojo de Žirovnice al Počátky kun Esperanto-tekstoj (*Li renkontas sian patrinon, Najlita al la kruco* ktp.)

■ En *Lidové noviny 163/2024* aperis artikolo de Věra Mikulášková **Ve věži, na střeše, v esperantu** (*En la turo, sur la tegmento, en Esperanto*) pri la historio de Radio-Brno. Bedaŭrinde la redakcio kurtigis la artikolon, foriginte ĝuste la parton pri Esperanto, kiu tial restis nur en la titolo (verŝajne mirigante la legantojn).

■ EK Mladá Boleslav eldonis libreton **Legaĵoj XIII** kaj enĉeĥigis polan infanlibron de Janusz Korczak **Král Mates I. Reformátor** (Reĝo Maĉjo la unua). La aŭtoro propravole mortis en gaskamero de Treblinka, ĉar li ne volis forlasi siajn infanajn judajn lernantojn.




J. Drahotová, tel. 720 652 320
drahotovaesperant@seznam.cz




■ **Stanislava Hošková** prezentos la 17-an de oktobro 2024 en Mladá Boleslav teatraĵon por unu aktoro pri Eliška Krásnohorská kaj ŝia rilato al Bedřich Smetana, de kies naskiĝo pasas ĉijare 200 jaroj.

■ **Virina kongreso** okazis dum UK en Aruŝa kaj oni preparas similan por Brno. La samon eblas diri pri la **infana kaj adoleskanta kongreseto**.

■ Post UK Brno sekvos ankaŭ en Brno **IKUE-kongreso** en palaco Petrinum en la strato Veveří.

■ Eskpozicio **Teo, Amo kaj la Mondo** realiĝos septembre en la slovaka urbo Žilina, kunlabore kun la ĉinaj esperantistoj. Temas pri afŝoj de ĉinaj, rusaj, litovaj, nepalaj kaj uzbekaj fotistoj.




■ Pri forgesita esperantisto kaj eminenta ĝardenisto **František Chvatík (1887-1978)**, amiko de Theodor Čejka, alportis tre detalan biografion en 10 daŭrigoj la informilo *Zpravodaj Bystřice pod Hostýnem* en la numeroj 2/2023 ĝis 12/2023. La informilo estas trovebla en la urba retejo de Bystřice pod Hostýnem. La sama informilo, sed jam en numeroj 9/2017 ĝis 12/2017 alportis biografion de **Josef Krumpholz**. Vidu: https://www.bystriceph.cz/archiv

■ **Moderna Esperanto** de Weilun Li (la hispana vicprofesoro de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato) estas plej furora lernolibro de Esperanto en Ĉinio, jam ekde 2007.

# Premio Deguĉi 2024

**Mramba Simba Nyamkinda** naskiĝis la 20-an de aprilo 1961 en Marambeka. Li estas tanzania esperantisto, estro de vilaĝaro Salama kaj fondinto de NRO Mazingira, kiu celas samtempe disvolvi sociajn kaj ekonomiajn bonfarton kaj naturprotektadon. Mramba Simba estas longtempa aktivulo en Tanzanio, en kaj ekster la esperantista movado. Lia laboro diskonigis Esperanton al lia komunumo; samtempe Esperanto ankaŭ ekhavis utilon al la komunumo. Li sukcesis konstrui akvoputojn por la loka socio kadre de la projekto Mazingira, konstruis lernejon **Esperanto Secondary School**, kie estas instruataj pli ol 800 infanoj, kaj starigis lokan radion, kiu regule elsendas informon por plibonigi la socion.



En la jaro 1983 li trovis artikolon pri Esperanto en loka ĵurnalo. Li serioze studis dek lecionojn de svahila lernolibreto. En la jaro 1992 li sukcesis kunvenigi esperantistojn en Daresalamo, kie li estis elektita la prezidanto de Tanzania Esperanto-Asocio (TEA), kiun li gvidis ĝis 1996. En la jaro 1998 li retranslokiĝis al sia vilaĝo por gardi kaj prizorgi sian familian grundon, kiun la tiamaj vilaĝestroj volis transdoni al aliaj personoj. En la sekva jaro 1999 la vilaĝanoj elektis lin en la vilaĝan estraron; li sperte plenumis sian oficon kaj proponis sukcesajn projektojn (la finkonstruon de bazlernejo kaj kliniko).

Plurfoje li estis elektita por la tutlanda parlamento kaj ankaŭ por la regionaj kaj distriktaj parlamentoj.

**Ilia Sumilfia Dewi** naskiĝis la 11-an de marto 1978 en Ĝakarto. Ŝi ekkonis Esperanton, estante 31-jara. Ŝi poste proponis organizi la kurson en la universitato, kie ŝi finis siajn studojn tri jarojn antaŭe. En novembro 2009 la enkonduka kurso sukcese okazis. Tiam estis la komenco de ŝia Esperanto-lernado. Ŝi memstare plu lernis per la retejo *Lernu.net* kaj lernolibroj *Esperanto per Rekta Metodo*, *Poŝamiko* kaj la libreto *Kunci*.



La 3-an de oktobro 2010, ŝi invitis amikojn starigi Esperanto-klubon en Ĝakarto. La klubo bone funkciis por reklami Esperanton kaj kolekti homojn, kiuj deziris kunlerni. Du fojojn monate okazis regulaj renkontiĝoj kaj bazaj kursoj. En decembro 2010 Ilia havis la eblon partopreni la unuan fojon en internacia aranĝo: nome la 29-a Komuna Seminario (KS) en Hanojo, Vjetnamio, organizita ĉiujare inter junuloj el kvar landoj: Ĉinio, Koreio, Japanio kaj Vjetnamio.

En 2013 okaze de la unua Indonezia Esperanto-Kongreso en Bogor, la kongresanoj decidis fondi landan asocion, la Indonezian Esperanto-Asocion (IEA). Ilia Dewi fariĝis prezidanto, kies oficon ŝi plenumas ĝis nun. En la sama jaro, ŝi ricevis subvencion de Komisiono de Azia kaj Oceania por Esperanto-Movado (KAOEM) por partopreni la 7-an Azian Kongreson en Jerusalemo. Poste, okaze de la 101-a UK en Nitro en 2016 ŝi ricevis la Diplomon de UEA pri Elstara Agado.

# Kunveno de eksaj tendaranoj de Somera Esperanto Tendaro en Lančov

Denove venis la tempo de renkontiĝo. Ni estas je unu jaro pli maljunaj kaj eĉ kelkaj el ni ne plu venos. Ĉi jara kunveno estis iom trista pro forpaso de longjara vizitanto, Jarda Suchánek el Frýdlant. Mankis lia gitaro ĉe vespera tendarfajro, mankis lia humuro, lia hejma alkoholeto. Do la unuan, vendredan vesperon, ni ne kantis. Ni sidis ĉe la fajro kaj en malgrandaj grupoj babilis pri okazintaĵoj de pasinta jaro, pri vivo.

Postan tempon jam la tendarvivo fluis kiel ordinare: sabate matene vekiĝkanto kun gitaroj de Vlado kaj Janík. La matenan gimnastikon sprite gvidis Vlado.

Poste sekvis matena ordono, matenmanĝo, komuna fotado kaj individua programo. Kelkaj iris al valbaraĵo por naĝi. Estis sufiĉe alta, pura, varma akvo. Ni rememoris, kiel iuj tendaranoj iam naĝis ĝis la digo, ŝipveturis, ĝuis la banadon spite malvarman veteron.



Posttagmeze iuj restis en la tendaro kaj aliaj per aŭtomobiloj veturis al urbeto Bítov, kie ili vizitis ekspozicion de malnovaj aŭtomobiloj, ekspozicion de eta fervojo, kanabo-farmaon, sukeraĵejon.

Vespere denove tendarfajro, ĉi foje kun kantado.



Dimanĉe post matenmanĝo adiaŭo kaj disveturo.

La restado en la tendaro estis tre bela, agrabla. La vetero estis favora, varma. Inter la kabanoj, sub altegaj arboj, regis agrabla ombro.



Koran dankon al la organizantoj: Olinka Lacinová kaj ŝiaj plenkreskaj, oferemaj „infanoj“ Lenka kaj Tomáš. Dankon por daŭrigo de la tendaro, plibonigo de ekipaĵo de kabanoj, dankon por la ebleco de kunvenoj de eksaj tendaranoj. Ilia juneco revenadas.

LChal

# Esperanto super la abismo



La amika renkontiĝo de esperantistoj okazis 6.8.2024 en urbo Hranice kaj ĉirkaŭaĵo. De fervoja haltejo Hranice-*město* ni ekiris piede al la fama Abismo de Hranice. Dum la piedirado tra arbaro ni povis admiri belan valon de rivero Bečva. De ĉi tie ni iris al estinta stacidomo Teplice, kiu nun servas kiel informcentro de la abismo, tie ni havis eblecon esplori la abismon per virtualaj okulvitroj. Sekva nia vojo gvidis nin tra la banloko Teplice n. B. kie ni gustumis mineralan akvon. Teplice apartenas al niaj ne tiom grandaj banlokoj, sed certe la loko estas vizitinda. Poste ni iris supren al Zbrašov, kie ni vizitis kioskon kaj renkotiĝis tie kun tiuj, kiuj ne volis iri piede. Tie estis tre vigla babilado kaj mallonga programo. Partoprenis pli ol dudek interesiĝantoj. Ni esperas, ke la aranĝo plaĉis al ĉiuj partoprenantoj.



*L. Hakl*

# Esperanto-arboj
## Velké Losiny



La 27-an de majo 1967 estis plantita Esperanto-arbo en la kastela parko de la kastelo Velké Losiny, konkrete temis pri kanada cugo (ĉeĥe *kanadská tsuga*, alivorte *jedlovec*). La arbon plantis esperantistoj el Šumperk kaj preskaŭ ĉiujare ili renkontiĝas en la parko fine de majo, kio jam fariĝis tradicio.



En 2013 ili solene senvualigis tabuleton sur la arbo.



# 2024 – la jaro de jubileoj

**Moto: Ne ĉiuj jubileaj aferoj estas indaj por jubili**

## Karel Čapek: KRAKATIT

La supre dirita moto ĝuste estas aludo al la evento, pri kiu temas la menciita libro…
KRAKATIT (Krakatito) estis eldonita en la jaro 1924… Tio estas ĝojiga informo, pri tio oni ne dubu… Trista estas la evento en ĝi pripentrita. (Jes, ĝi instigis la aŭtoron per vortoj bildigi  la trajtojn de la epoko, kiun reale travivi certe eĉ lia imagpovo ne deziris; des malpli la tiamaj homoj; tamen – oni ĝisvivis…)

Jen: La 25-an de majo 1917, precize je la 13,35 horo, ektremis la regiono ĉirkaŭ Plzeň (Pilzeno) pro 20-foja eruptado, kiun kaŭzis la eksplodo de munici-produktejo en Bolevec (filio de Škoda-entrepreno, Plzeň). La milit-etapo… plialtigita kapacit-bezono de laboristoj… Des pli da damaĝoj… Da homviktimoj estis ĉirkaŭ 200, inter ili 33 nematuraj (do geinfanoj).
Karel Čapek (ĵurnalisto, verkisto) tiujn efikojn eksentis preskaŭ „sur sia haŭto".
Li troviĝis en sia unua (post universitato) okupejo – en la kastelo Chyše, kie li estis protektoro (instruisto) de  filo de la grafo Lažanský. La loko troviĝas en la okcidenta parto de Bohemio, same kiel Plzeň; kaj eĉ tie senteblis la tremado, eĉ videblis fumego (el de proksima altaĵo).

Influita de la evento, K.Č. komencis verki la libron, kiun li nomis KRAKATIT  – laŭ la indonezia vulkano „Krakatoa", kiu kaŭzis grandmezuran katastrofon sur la insuloj Javo kaj Sumatro, en la jaro 1883. Da viktimoj tie estis  36 000.

Kaj kiel estis dirite, la libro eldoniĝis en la jaro 1924…

*Mia aldono: antaŭ kelkaj jaroj ni ekskursis en Skotlando. En viski-produktejo, sub la monto Ben Nevis, gustumante la „skotan oron" ni aŭskultis jenan informon: „En la dua mondmilito okazis bombatakoj ankaŭ al nia produktejo. La bomboj falis – sed ne damaĝis, ne eksplodis; kaj tiam, kaj nun, ni sendis nian pensdankon al laboristoj de la Škoda-produktejo pro ties fuŝado de municio." Tiun eldiron ni ĝoje aŭdis…*

*Margit Turková*

Rimarkigo: *La romano estis dufoje filmita de reĝisoro Otakar Vávra, en 1947 kaj 1980.*

*Al Esperanto lastajn ĉapitrojn tradukis d-ro František Vaněk (1884-1957). Ni legu pri eksplodo:*

Subite aperis super Grottup giganta nigra maso, ĉio estingiĝis kaj post unu sekundo mallumo kvazaŭ disiĝis, eksaltis fajra kolono, terure ekflamis kaj disĵetis kiklopan fumobaron. Samtempe ekblovis muĝanta ventofrapo, io ekkrakis, la urboj knare ekmurmuris, kaj krak, terura viposvingo, bruego, tondrantaj batoj, la tero tremas, en aero freneze kirliĝas la forŝirita foliaro. Prokop buŝkaptante la aeron tenas sin ambaŭmane sur la soklo de la kruco por ne esti forbalaita, li gapas grandokule en la ardantan fajrujon ... Kaj disfendiĝos la Tero per potenco fajra kaj en tondra bruego ekparolos la Eternulo ...

# Aktivadoj de E-klubo de Přerov

Merkredon la 26-an de junio 2024 kolektiĝis membroj de la Esperanto-klubo de Přerov en loĝejo de la kluba sekretariino s-anino Květoslava Černá kadre de ne plu regulaj renkontiĝoj, kiel estis antaŭ la pandemia periodo. Sekvis diverstemaj babiladoj koncernantaj precipe la kluban vivon.



Nur unu semajnon poste, ankaŭ la merkredon la 3-an de julio, kolektiĝis denove samloke dek klubanoj, por kune en la amikeca medio soleni 60-jariĝon de la kluba prezidanto s-ano Antonín Krejčíř (sur la foto li tenas la flagon kun s-ino Černá). Bedaŭrinde ne ĉiuj povis resti ĝis la fino kaj kelkaj pravigis sian neĉeeston pro malsano aŭ alia grava kaŭzo malebliganta ilian ĉeeston.

Por gratuli la kluban prezidanton okaze de lia grava datreveno venis ankaŭ s-ino Inĝ. Daniela Novotná (la tria staranta de maldekstre) – la estrino de la fako de la magistratestro de Přerov, kiu estas bone konata al la klubanoj pro sia ofta partopreno de la klubaj aktivadoj.

Dum la renkontiĝo estis ankaŭ pritraktitaj kelkaj klubaj aferoj, precipe ankaŭ plano de la venontaj renkontiĝoj. Poste okazis agrabla interbabilado kune kun la kluba favorantino el la urba magistrato s-ino Inĝ. Daniela Novotná. Kompreneble ankaŭ estis farita komuna foto kun tiuj, kiuj ankoraŭ ĉeestis, por dokumenti la gravan vivjubileon de la kluba prezidanto.

La ĉeestantoj sin adiaŭis kun deziro pri la denova renkontiĝo aŭtune post la someraj ferimonatoj. Do ĝis la revido!

*Miloslav Šváček*

# 115-jariĝo de Esperanto-klubo Prostějov

La 15an de junio 2024 festis Esperanto-klubo Prostějov sian 115-an jubileon de sia fondo.




Ni renkontiĝis ĉe stacidomo kaj promenis al la klubejo sur la placo de T.G. Masaryk.

Tie ni ricevis trinkaĵojn kaj inform-materialon pri la regiono kaj speciale Gvidilon de Prostějov en Esperanto. Oni parolis iom pri la historio de la klubo, ni trarigardis kronikon de la klubo kaj rememoris forpasintajn esperantistojn, ne nur el Prostějov.



Poste ni iris en brandodistilejon U Zeleného stromu, kie nuna prezidanto Jaroslav Liška aranĝis trarigardon kun gustumado.




Tio estis speciala ebleco nur por ni, ĉar la firmao ne plu ebligas trarigardojn. Do danko apartenas ne nur al prezidanto de la klubo, sed ankaŭ al sinjoro Roman Petruš, direktoro de la produktado, kiu estis ege afabla, volonte respondis ĉiujn niajn demandojn kaj pasis kun ni pli da tempo, ol estis interkonsentite. Posttagmeze ni trapasis memorlokojn de E-klubo kaj straton Esperantská, trarigardis ĉirkaŭaĵon de akvobaraĵo Plumlov kaj de kastelo Plumlov.

Tie ni kafumante daŭre babilis ne nur pri historio de Esperanto kaj la klubo, sed ankaŭ pri estontaj aranĝoj, kiel Universala kongreso 2025 en Brno.



Ekestis propono aranĝi unu el kongresaj ekskursoj en belegan Prostějov.




La aranĝo estis kiel ĉiam bonege preparita kaj pasis ne nur en belega vetero, sed ankaŭ en bonega etoso.



*Libuše Hýblová*

# Rumana esperantista simpozio en Tăuţii Măgherăuş

Nur malofte povas tri elstaraj rumanaj esperantistoj komune soleni la saman jubileon. En tiu ĉi jaro enkadre de rumana esperantista simpozio (17 – 19 majo 2024) festis sian 80-an datrevenon Emil Crâncău [krinkeu], Terezia Scurt [skurt] kaj Mihai Trifoi [mihaj trifoj].

En Distrikto Maramureş [maramureŝ], proksime de regiona urbo Baia Mare [baja mare], troviĝas urbeto Tăuţii Măgherăuş [teuci megereuŝ].

Belega submontara pejzaĝo de valo de la rivereto Nistru, nia simpoziejo, hotelo Cuarţ [kuarc], kies nomo (Kvarco) atestas pri fama minista pasinteco, kune kun bonega rumana kuirado kreis taŭgajn kondiĉojn por renkontiĝo de 23 esperantistoj el Rumanio, Hungario kaj Ĉeĥio.



Mariana Pitar, prezidantino de Rumana Esperanto-Asocio, prelegis pri numerologio, Aurora Bute pri Eŭropaj valoroj kaj esperanto kaj Oldřich Arnošt Fischer pri orĥideoj. Ankaŭ prelegoj de Mihai Trifoi "Inceputul ascensiunii" ("Komenco de Ascensio") kaj "La Vivo dum la Tria Aĝo" estis interesaj.

Emil Crâncău, kiu verkis kaj proprakoste eldonis sian libron "Esperanto - Limbă Universală" ("Esperanto – Universala Lingvo", 227 paĝoj), estis ĉefa aranĝanto kaj mecenato de la simpozio. Pro sia longtempa laboro por kultura vivo de la urbeto li fariĝis honora civitano de Tăuţii Măgherăuş. La solenon kaj kulturan vesperon riĉigis prezentado de grekaj kaj rumanaj dancistoj kaj kantistoj.




En libera tempo ni trarigardis mineralogian kaj subĉielan muzeojn en Baia Mare, kies ĉirkaŭaĵo estas bonfama pro ekspluatado de metalaj ercoj. Lastan tagon ni travivis en muzeo de Emil Crâncău en Tăuţii Măgherăuş, kie ni konatiĝis kun folkloro de la Distrikto Maramureş.

Rumanaj esperantistoj certe partoprenos en la 110a Universala Kongeso en Brno (2025).

*Oldřich Arnošt Fischer*
*teksto kaj foto*

# Te-ceremonio en la Maljunulejo en Ústí nad Orlicí



La 18-an de junio esperantistoj el Svitavy vizitis la duan fojon la Maljunulejon en Ústí nad Orlicí, kie loĝas ilia amiko Karel Čada. Dum la unua vizito ni kaj Karel konigis Esperanton kaj la interesan vivon de esperantistoj al la loĝantoj de la Maljunulejo.



Ĉar ni havas en nia klubo ankaŭ ĉinan esperantiston Li Huang, ni promesis al ili teceremonion kiel ĝi estas instruata en Ĉinio en universitato. Li Huang konigis la publikon pri la kultivado de teo, ĝia prilaborado kaj la diversaj specoj de teo en Ĉinio. La ĉeestantoj havis okazon gustumi la teon.

# Tom Hall vizitis Svitavy




Baldaŭ post la foriro de Ruben Fernández Asension el Hispanio, Tom Hall el Slovakio telefonis kaj interesiĝis viziti la Muzeon de Esperanto. Tom Hall nomiĝas Tomáš Halža kaj li loĝas en Košice, kie li estas membro de la Esperanto-klubo. Li iris al Svitavy por 4 tagoj kaj jam planis kion li vizitos. Ni dediĉis unu tagon al la urbo Svitavy, kiam membro de la loka klubo, Jan Richtr, kondukis lin al la turo kaj detale konigis al li la historion de la urbo. Kune ni vizitis ankaŭ la Urban Muzeon kaj Galerion, kie li rigardis la sekcion dediĉitan al Oskar Schindler, la rekon-struitan betlehemon de Svitavy kaj la ekspozicion de malnovaj motorcikloj, kie unu historia foto montras benzinujon kaj aerdistribuilon antaŭ la Urba Korto kun

Esperanta stelo. Tom ankaŭ ĝojis pri la domo Otendorfer kun ĝia grandioza halo.



Li ekskursis al Žamberk, kie estas eksponata fervoja maŝino, kies rekonstruon li mem partoprenis. Li estas feliĉa reveni al Svitavy iam ajn.

*Libuše Dvořáková*

## La interŝanĝo de muzeaj materialoj daŭras

La 20-an de junio 2024 gesinjoroj Dvořák el Svitavy vizitis Esperanto-Arkivon kaj Bibliotekon en Nová Dubnica, Slovakio. La arkivo estis ceremonie malfermita la 24/06/2023 dum la Tutslovaka Kongreso de Esperantistoj kaj nomita laŭ Ján Vajs okaze de lia malfrua 70-a naskiĝtago. Ján Vajs estis aktiva slovaka esperantisto, prezidanto de Slovaka Esperanto-Federacio kaj sekretario de la e-klubo en Liptovský Mikuláš.



Li multfoje prelegis ankaŭ en la Muzeo de Esperanto en Svitavy. Dum nia vizito al Nová Dubnica ni donacis al Peter Baláž, eldonisto, prezidanto de Slovakaj Esperantistoj kaj administranto de Esperanto-organizo E@I, librojn de la Esperanto-Muzeo en Svitavy, kiujn ni plurobble havas kaj kiujn niaj slovakaj geamikoj elektis. En la arkivo kaj biblioteko laboras ankaŭ esperantistoj el eksterlando. Ilia laboro estas tre ampleksa kaj meritplena. Nia kunlaboro daŭros.

*Libuše Dvořáková*



# „Falĉila tago“ – reveno en la tempon de niaj avoj

„Falĉila tago“ (ĉeĥe: kosecký den) en Vracov estas ŝatata aranĝo de Esperanto-klubo en Ratíškovice, ĉe kiu kunvenas krom nia familio ankaŭ esperantistoj el proksima ĉirkaŭaĵo, ĉi-jare escepte ankaŭ gastoj el Svitavy kaj Dobřichovice.



Oni falĉas herbejon, kiu formas signifan parton de nia nove fondita ĝardeno. Ĉio komenciĝis antaŭ tri jaroj, kiam la tutan herbejon falĉis unu falĉisto. Ĉi-jare la riĉe florantaj herboj faladis sub 4 falĉiloj.

La aranĝo okazas ĉiam en alia dato, kiel la vetero permesos. Ĉi-jare ĝi trafis kuraĝe la tagon de sankta Medardo (la 8-an de junio), sed li estis afabla kaj prokrastis la pluvon.

Kiel aspektas la reveno en la tempon de niaj avoj? Ĝi komenciĝas per tradicia matenmanĝo, kiun preparas la dama parto de la partoprenantoj. Por enkonduki la „falĉilan tagon“ ekzistas nenio pli bona ol tranĉaĵo de freŝa pano de la loka bakejo, ŝmirita per porka graso, surŝutita per haketita cepo, kaj aldone bongustaj ovoj de hejmaj kokinoj. Por trinkado kafo, teo, buterlakto aŭ nur florakvo, ĉio laŭ plaĉo de ĉiu partoprenanto.

Antaŭ ol la herbejo falos sub la lertaj manoj de falĉistoj, ni plukas amason da herbejaj floroj, por ke ĉiu povu forporti hejmen aroman memoraĵon pri tiu tago. Poste la loko disponeblas por la falĉiloj.



Kiu interesiĝis, eksciis ĉion bezonan pri la tekniko de falĉado per falĉilo kaj ankaŭ povis mem provi. Daŭris nelonge kaj ĉio estis finita. Ankoraŭ la saman tagon venis por la freŝa herbo loka ĉevalbredisto, por ke liaj bestoj tuj frandu la bonodorantan manĝon. Post fino de la laboro restis tempo ripozi en ombro de arboj, kafumi kun hejmaj kukoj, stangorosti sur fajro cervelasojn, simple ĝui kunsidon ĉe riĉe regalita tablo. La ĝusta tempo por babilado. Kiu restis ĝis vespero, povis gustumi bonan vinon de lokaj vitokultivistoj. La humoro brila, la ĝardeno banata de la suno ... koncize ... hejmeca etoso. Kiam estos la venonta „falĉila tago“? Tion decidos la naturo, sed ni jam nun atendas ĝin kun ĝojo.

**Jirka kaj Anna Vyšinka**

# Ekskurso por admiri belaĵojn de Orlica Montaro

Ni ĉiam planas klubajn eventojn kaj vojaĝojn por la tuta jaro jam en februaro. Unu el la grandaj aranĝoj de la klubo ĉi-jare estis ekskurso por ekkoni la Orlican Montaron kaj la ĉirkaŭaĵon inter la 11-a kaj 14-a de julio 2024. En la unua tago, ni haltis ĉe la digolago Pastviny, kiu estas plena de fiŝoj kaj ankaŭ estas uzata kiel somerumejo. Ĝia konstruo estis planita kaj komencita komence de la pasinta jarcento. Krom malhelpi inundojn, la kialo de la konstruado estis ankaŭ la produktado de elektro. Ni daŭrigis nian vojon vizitinte la rekonstruitan barokan preĝejon de Ĉieliro de la Virgulino Maria en Neratov, kiu estas ne nur konata pro sia vitra tegmento, sed ankaŭ estas grava pilgrimejo. Ni interesiĝis ankaŭ pri laboro de Neratov-Asocio kaj ĝia laboro kun handikapuloj.



Post vizito de Neratov, ni iris al Uhřínov, kie ni aŭskultis kun intereso atento-kaptan klarigon dum trarigardo de la subĉiela muzeo VILLA NOVA (Arkeologia muzeo en la naturo, kiu klopodas alproksimiĝi al la mezepoka koloniiga vilaĝo en la periodo de la 13-a kaj 14-a jarcentoj), poste ni veturis engastiĝi en Rokytnice en Orlica Montaro (nomata laŭ rivero Orlice = aglino). Post mallonga ripozo ni faris fruvesperan promenon al – ŝatata de turistoj – Landa Pordego kun Kontrabandista Piedira Ponto. La proksimiĝantaj fulmoj kaj tondroj kaj pluvetoj malkuraĝigis nin de la vojo al roko Ledříček. Post tia promeno ni bone ekdormis.



Ni havis multon planitan ankaŭ por la sekva tago, do ni ekiris baldaŭ post la matenmanĝo. Unue ni rigardis la mirindan mekanikan Betlehemon de Probošt en Třebechovice pod Orebem. Interesa estis ne nur la klarigo de la ĉiĉeronino kaj funkciigo de la betlehemo, por ke ni vidu kiel ĝi laboras, sed ankaŭ la kolekto de aliaj betlehemoj el la tuta mondo. De Třebechovice ni iris al Opočno, kie interesiĝantoj vidis la kastelparkon kaj ĝardenojn, estis ankaŭ tempo por trarigardo de la urbo. Tamen ni volis tagmanĝi en gastejo Peklo (= infero), do ni frue ekiris al Nové Město nad Metují kaj post iom da tempo ni jam sidis en la komforta ĉambro de Bartoň.

Kelkaj el ni ne povis rezisti la lokan oferton, do ni gustumis ankaŭ la regionan specialaĵon – Pavlišov-eskalopon – en agrabla inferula medio.



Kun plenaj ventroj ni reiris al la gastejo Pytlák (= ŝtelĉasisto), kie ni loĝis, sed survoje ni ankoraŭ havis tempon por vidi la placon kaj la kastelĝardenon en Nové Město nad Metují kaj grimpi la kastelturon, kelkaj el ni haltis en Dobruška por vidi la domon, kie naskiĝis F. L. Hek, kaj proksiman Kartografan Muzeon. Ni havis multajn demandojn, kiuj al la ĉiĉeronino ŝajnis tiel profundaj, ke kelkaj eĉ ricevis kiel donacon belajn bildoriĉajn eldonaĵojn pri la historio de la armeo kaj de ĝia topografia servo. Amantoj de bestoj faris mallongan halton ĉe ĉasbesta parko Klopotov. Kaj vespere ni babilis, kradrostis, ludis nian ŝatatan Skrablon en Esperanto kaj planis la sekvan tagon.

Merkredo temis pri turismo kaj vizito al la plej alta pinto de Orlica Montaro – Velká Deštná. Matene la vetero ne estis tre afabla al ni, do ni unue esploris komunumon Deštné, vizitis la Infocentron por preni diversajn turismajn suvenirojn, bildkartojn vizitkartojn, stampaĵojn... Poste ni iris al la Muzeo de Vintraj Sportoj, Turismo kaj Metioj. Kiam la rondpromeno finiĝis, ĉesis pluvi kaj ni jam vere malsatis. Survoje ni vizitis la faman Kapran Stalon (la bestoj malantaŭ la barilo tuj evidentigas al venantaj vizitantoj kial la restoracio havas ĉi tiun nomon), tie ni taŭge plifortiĝis antaŭ ol grimpi al la observejo Velká Deštná.



Survoje ni multe interparolis kaj post unu horo irante de la parkejo sub la Masaryk-kabano ni atingis la supron. Bela observa turo kaj rava panoramo!

Jam tie ni montris al ni la sekvan planitan haltejon – la jam menciitan Masaryk-kabanon sur la monto Šerlich [ŝerliĥ]. Ni restis tie nur mallongan tempon, ni ankoraŭ volis ĝustatempe veni al hotelo nomata Šerlišský Mlýn (Šerlich-muelejo) kun ĝiaj famaj mirtelaj kukoj, kaj tion ni sukcesis. Ni povis admiri la interesan montan arkitekturon kaj la interese aranĝitan ĉirkaŭaĵon de la hotelo.



Ni havis sufiĉe da kilometroj en niaj kruroj por la tuta tago, do ni estis feliĉaj komenci la marŝadon reen al Rokytnice. Post iom da malstreĉiĝo, ni denove pasigis la vesperon parolante, ludante, interŝanĝante spertojn kaj planante la lastan tagon de nia evento.

Kaj estis dimanĉo. Ni saltis el la lito frumatene, jam je la naŭa ni havis interkonsentitan trarigardon de la Eklezia Domo en Kunvald. La kompleza gvidisto Saša Bezrukov malfermis por ni la Domon unu horon pli frue ol la oficiala malferma tempo, li rakontis al ni iom pri la fondo de la unua kongregacio de la Frata Unueco kaj pri la enhavo de la ekspozicio. La trarigardo finiĝis per interesa mallonga filmo. Ni ne restis longe, atendis nin vizito al la Muzeo de Puntoj en Vamberk. Tie nin surprizis la amplekso de la ekspozicio dokumentanta la evoluon de la puntofarado en Orlica Montaro de la fino de la 19-a jarcento ĝis la nuntempo, kaj ankaŭ rekte fascinis nin la lerteco de la puntofaristinoj de la vamberka punto-skolo.

Vizitinte la Muzeon de Puntoj, ni iris al la lasta planita loko - Potŝtejn. Kelkaj el ni lastatempe vizitis la lokan kastelon kune kun la instruistaro de elementa lernejo Riegrova el Svitavy, do ĉi-foje ni nur promenis en la urbo, rigardis la historian kernon de Potŝtejn kun la empira preĝejo de St. Laŭrenco, iris al Bělisko, rigardis la eksteraĵojn de la malfrubaroka kastelo, Městečko - la plej malnova parto de Potštejn, kaj ni ne forgesis viziti la interesan retro-sukeraĵejon Mareček. Kaj post bona tagmanĝo en loka restoracio, ni iris hejmen.



Vagado tra Orlica Montaro estis bela kaj interesa. Grandega avantaĝo estis, ke ni ne renkontis amasojn da turistoj kaj povis ĝui la belecon de la naturo, loka arkitekturo kaj ekkoni la historion de la regiono. Ĉio ĉi en la agrabla kompanio de la Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy kaj niaj simpatiantoj. Ni jam antaŭĝojas la venontan komunan aranĝon.

*Miroslav Sýkora*

# Jubileantoj de julio, aŭgusto kaj septembro 2024

Emil Faltýnek, Předměřice nad Labem
Jaroslav Chodníček, Holešov
Miluše Jakoubětová, Bezděčín
Václav Kaprál, Kaznějov
Ing. Stanislav Kareš, Hořice v Podkrkonoší
Ing. Věra Koloničná, Frýdek-Místek
Zdena Lochařová, Praha
František Plášek, Šumperk
Jitka Skalická, Praha
Zdeněk Skovajsa, Starý Hrozenkov
Ludmila Šatánková, Střítež nad Ludinou
Anežka Štěpánková, Praha
Ing. Margit Turková, Obořiště
Ing. Karel Votoček, Štětí
Ing. Mária Pilková, Jihlava

Al ĉiuj jubileantoj ni deziras kontenton, sanon, viv-forton por pluaj jaroj!

## Margit Turková

Honora membrino de ĈEA en aŭgusto



ĝisvivis duonrondan jubileon. Pli frue konata kiel Strnadová (fraŭline Kvietková) ŝi lernis Esperanton en 1970, kaj baldaŭ aktivis en la movado. Plej multe ŝi kunlaboris kun E. Seemannová, Č. Vidman, E. Urbanová, J. Karen, J. Rumler, V. Ludíková kaj L. Vondroušková. Ofte ŝi kontribuas al Praga Bulteno kaj Starto, esperantigis librojn *F.V. Lorenz* de V. Novobilský kaj *Spirita revolucio* de P. Pitter. Kun M. Ribasová ŝi preparis *Gastronomian vortaron*. Lingve ŝi kontrolas *Informilon de AEH*.

# Informace o UK Brno 2025

**Kongresový poplatek je možno platit na účet ČES do 22.11.2024** (konec první periody, po níž se poplatky citelně zvyšují). Účet viz str. 94, kód 06944. Služba pouze pro členy ČES.

**Bude také možnost platit v hotovosti na konferenci v České Třebové**.

- Přímý člen UEA 145 EUR (3660 Kč)
- Nepřímý člen: 180 EUR (4540 Kč)
- Mládežník, invalida, společník
  přímý člen: 70 EUR (1770 Kč)
  nepřímý člen 105 EUR (2650 Kč)

(Mládežník 21-30 let, mladší zdarma; společník = rodinní příslušníci na stejné adrese, jeden platí plný poplatek, druhý jako společník).

Podrobněji na internetové přihlášce: https://uk.esperanto.net/2025.

**Přímí členové** potřebují zaplatit členství na rok 2025 stejně jako noví zájemci (kód 06941 při platbě na účet ČES):

Kategorie MB (reta revuo Esperanto) 27 EUR (680 Kč)
Kategorie MA (papera revuo Esperanto) 57 EUR (1440 Kč)
Kategorie SZ (Societo Zamenhof) 114 EUR (2900 Kč)
Kategorie PT (Patrono de TEJO) 44 EUR (1110 Kč)

Další informace poskytne hlavní delegát UEA pro Českou republiku
Petr Chrdle, Dobřichovice,
chrdle@kava-pech.cz, 736 645 455

# Jaroslav Suchánek

## 1955 - 2024

RNDr. Jaroslav Suchánek naskiĝis la 16-an de januaro 1955. Post studado de fiziko ĉe matematika-fizika fakultato de Karola Universitato li laboris kiel fizikisto ĉe VŽKG (ferfabriko en Vítkovice) kaj ČEZ (energetika entrepreno), post 1990 li fariĝis deputito de ĉeĥoslovaka parlamento.






Inter la jaroj 1993-1998 li funkciis kiel ambasadoro de Ĉeĥa Respubliko en Aŭstralio. En tiu funkcio li surprizis la Universalan Kongreson de Esperanto en la aŭstrala Adelajdo (1997), kiam li alparolis la kongresanojn en flua Esperanto.



Montriĝis, ke li estas multjara esperantisto, kaj post reveno al la patrujo li aktivis en la esperantista klubo Ostrava-Vítkovice. Ekzemple la famaj ovofritaĵoj okazis en liaj domo kaj ĝardeno.

Li vivtenis sin kiel instruisto de la angla kaj tradukisto el la angla, tamen li propagandis Esperanton, kiam li estis invitita al televido. Regule li partoprenis renkontiĝojn de eksaj tendaranoj en Lančov, kie li gitarludis kun Vlado Rataj ĉe tendarfajro kaj matena kanto de vekiĝo.



Li partoprenis en UK 2023 en la itala Torino kaj planis partopreni en la tanzania Aruŝo 2024 kaj aparteni al LKK en Brno 2025.



Estis vera ŝoko, kiam venis informo, ke la 6-an de julio 2024 (tri semajnojn antaŭ la flugo al Aruŝo) li subite mortis dum feriado en Italio.

*mm*

# Jak platit svazu

## Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
č. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
**51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio
**80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

# Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335.** Předplatné uhraďte na účet u **Raiffeisenbank, č. ú. 101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

**Juna Amiko:** 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

**Literatura Foiro:** 1450,- Kč (*970,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)*

**La Ondo de Esperanto** aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (https://sezonoj.ru/), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

**Estas tri abonkategorioj:**
**1. Abonanto – 400 Kč**
**2. Amiko – 800 Kč**
**3. Patrono – 2600 Kč**

**Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.**
**55. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**
**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,**
svubova@esperanto.cz

**Uzávěrka příštího čísla**: 15.11.2024

-----------------------------------------
-

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 55-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 15.11.2024

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

# KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en Eventaservo.org
kaj Kalendaro de Esperanto.cz.

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de E-Klubo en Brno (Esperantobrno.cz). Gastoj bonvenas!

**2024-09-27/29** **ĈEA-konferenco** en Česká Třebová, komitato@esperanto.cz
**2024-10-15/17** Konferenco de ĈeFEA en Ramzová, cefea@centrum.cz
**2024-11-08/10** **La 20-a BIERO** en Hořice, e-mentalprago@seznam.cz
**2024-12-08** Marcipana Kristnasko
**2024-12-15** Kreado de bondeziroj (přáníčka) ambaŭ en Svitavy, svitavy@esperanto.cz

## Elekto de gravaj aranĝoj eksterlande

**2024-09-20/22** Beneluksa Kongreso en Hasselt, limburg@esperanto.be

**2024-11-07/10** KAEST Žilina kaest.ikso.net, kaest@ikso.net

**2024-11-28/12-01** Virtuala kongreso de UEA vk.esperanto.net/2024
**2024-12-14** Zamenhoffesto en Vieno kaj ĉeeste, kaj virtuale, aef@esperanto.at

**2024-12-28/2025-01-03** Luminesk' 2024/2025

Internacia renkontiĝo de GEA en Bielefeld luminesk@esperanto.de





Te-ceremonio en la Maljunulejo
en Ústí nad Orlicí




Renkontiĝo de eksaj tendaranoj en Lančov



Tom Hall en Svitavy




Semajnfina vizito de Grazanoj en Prago



Falĉila tago en Vracov



„Helpu helpi“ kadre de la bonfara Evento BRIKO en Prago